

STARTO

N-ro 1/2025 (294)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto Milan Kolka

Brno gastigos
la 110-an Universalan Kongreson de Esperanto
26.7. – 2.8. 2025

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupu@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Slovo předsedy

Vážení členové Svazu
a čtenáři STARTA,

přeji vám v tomto roce, v roce pořádání Celosvětového kongresu esperantistů v České republice, hodně zdraví, štěstí a úspěchů.



Uspořádání kongresu přináší řadu výzev a každá pomoc je vítána. Každý z nás může pomoci v rozsahu svých možností. Kongres aktivně připravuje sedmnáctičlenný přípravný výbor (Loka Kongresa

Komitato – LKK), ale přesto zůstává množství práce, pro kterou hledáme další dobrovolníky. Ať už se jedná o tlumočení, průvodcovství, pomoc při exkurzích či zajištění tisku a distribuce kongresového kurýra. Stejně tak důležitá je služba při příjezdu a odjezdu účastníků na nádraží, případně na letišti. Jsou činnosti, které vyžadují plné nasazení před kongresem a další, které vytěžují až v průběhu vlastního kongresu. V každém případě jsme za každou pomocnou ruku vděční, už proto, že naše práce je dobrovolná. Atmosféra tak velkého mezinárodního setkání, které nepotřebuje tlumočníků, je nakažlivá a často může vyburcovat účastníky k další práci, třeba ke zvyšování své jazykové úrovně či organizaci podobných setkání.

Činnost našeho Svazu samozřejmě nestojí a nepadá s pořádáním UK 2025 v Brně. I když všichni členové výboru pracují rovněž v LKK, snažíme se současně naplňovat i další cíle, které od nás členové očekávají. Dlouholetým palčivým problémem je získávání nových členů a s tím spojená výuka jazyka. Kongres v Brně nepochybně zvýší pově-

domí o esperantu u české veřejnosti. A co dál? Kdo je ochoten a schopen učit jazyk? Výboru se v minulém roce podařilo, přestože nakladatelství KAVA PECH utlumuje svoji činnost, opětovně vydat učebnici *Esperanto přímou metodou* od Stana Marčeka. Ale učebnice sama o sobě další členy nepřivede. Je to jen nástroj. Je to pomůcka, ale o její využití se musí zasadit všichni. Potřebujeme další učitele esperanta. Pohybujeme se v začarovaném kruhu, kdy nejsou učitelé, protože nemají koho učit a současně se bojíme investovat do náboru žáků, protože by větší množství kurzistů neměl kdo učit. V současnosti máme jednu učitelku korespondenčních kurzů a jednoho učitele online kurzů. Jsme vděční všem místním klubům, které dove- dou i v této době zorganizovat prezenční výuku ve svých klubovnách, zajistit lek- tora esperanta a získat nové kurzisty. Kdo to někdy zkusil, ví, že to není jednoduchá práce. Výbor ČES se proto bude v následujícím období snažit získávat další lektory, kteří budou ochotní a schopní učit jazyk, ať už online formou nebo prezenčně v místních kroužcích.

Dalším dobrým počinem ke zlepšení jazykové úrovně členů je pravidelné BABILADO na internetu. Po vzoru pražského babilada, kdy se zájemci scházejí v kavárně a procvičují si konverzaci na dané téma, vznikla obdoba realizovaná na internetu. Schází se pravidelně každé úterý na internetu a konverzují v esperantu. Je to vynikající příležitost pro každého, kdo nemá možnost pravidelně navštěvovat esperantský klub a procvičovat si znalosti jazyka. Dnešní technologie to umožňují. Jenom si dodat odvahy je využívat. A to platí nejen pro členy, nýbrž i pro celý Svaz a jeho výbor.

Mgr. Ing. Jiří Tomeček, předseda

Poděkování

Milí esperantisté, přátelé esperanta,

S koncem roku a začátkem nového vám píši s poděkováním.

Děkuji vám všem za váš zájem o esperanto. Děkuji vám všem, kdo se o esperanto zajímáte, učíte se je, mluvíte jím, komunikujete v něm. Tímto rozvíjíte nejen sami sebe, ale i celou komunitu esperantistů, rozšiřujete ji a obohacujete ji o to nejcennější, co můžete světu dát – sebe.

Zejména chci poděkovat vám, kdo organizujete esperantské akce – fyzická setkání v dnešní době jsou cenná a ne úplně běžná. Lidský kontakt, setkání, dotek – to je dle mého něco jedinečného, co v dalších jazycích v takovém množství jen tak nenajdete. Děkuji všem vedoucím klubů a jejich spolupracovníkům/cím za organizování schůzek, starost o jejich program a klubovny.

Děkuji všem organizátorům/kám výletů – místních, mezinárodních, půldenních, vícedenních – zážitky z těchto setkání jsou jedinečné a jsou možné jen díky jazyku, který nás na nich svádí dohromady – esperantu.

Děkuji vám všem, kteří podporujete fungování Českého esperantského svazu svým členstvím – tím, že jste členem/kou dáváte najevo světu kolem vás, že esperanto má ve vašem životě důležité místo.

Děkuji vám všem, kteří jste fungování svazu podpořili finančním darem – takto získané peníze jsme použili na znovu-vydání Marčkovy učebnice a vydání nového slovníku Miroslava Malovce. Jsme rádi, že v roce konání Světového kongresu v Brně zájemci z řad české veřejnosti budou mít dostupný tištěný slovník pro případné studium. Vaše

finanční podpora tuto investici usnadnila.

Děkuji i vám všem, kteří esperantem nevládnete, ale s esperantisty se setkáváte. Věřím, že tato setkání vás naplňují radostí, příjemnou atmosférou, pohodou. Díky, že tato setkání v podobném duchu spoluutváříte a podporujete tak radost z esperanta.

Rok 2025 bude pro řadu aktivních esperantistů naplněný zejména přípravou Světového kongresu v Brně letos v létě. Držme nám všem palce, ať se kongres vydaří a stane se důstojnou vizitkou českého esperantského hnutí. A určitě se budeme těšit na podzimní setkání na republikovém kongresu ČES v Havířově.

Ať se nám všem v novém roce dobře daří.

Srdečně přeje

Mgr. Ing. Jiří Tomeček, předseda

ĈEA-kongreso 2025

En la jaro 2025 okazos kongreso de ĈEA en bela regiono de nordorienta parto de nia lando proksime de urbo Havířov. Ni kunvenos **de vendredo la 17-an ĝis la dimanĉo la 19-an de oktobro.**



La kongreso okazos en pensiono Jaškovská krĉma. La restoracia teraso proponas belan vidon je valbaraĵo Těrlice. La ĉirkaŭaĵo proponas belegajn lokojn por promenado.

La programo kaj aliĝilo estos baldaŭ disponeblaj.

**Výsledek hospodaření ČES za rok 2024, plán na rok 2025
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

Příjmy	pl.2024	sk.2024	pl.2025	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2024	
Příspěvky na běžný rok	11 000	11 620	11 000	peněžní prostředky	
				pokladna korunová	0
Příspěvky na budoucí rok	18 000	14 110	14 000	pokladna eurová	0
Dary členů	10 000	23 455	15 000	ceniny	0
Dary nečlenů		100		účet Fio	1 458
Dotace		0		účty Fio spořicí a termínované	597 598
Starto předplatné		495		peníze celkem	599 056
Konference a sjezdy	52 500	91 187	85 000	<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>106 620</i>
Činnost klubů a sekcí bez PS		0		investice	
Muzeum		0		podílové listy	174 685
Libroservo	18 000	13 636	15 000	investice celkem	174 685
Kurzy esperanta	4 000	11 200	5 000	<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>0</i>
Příspěvky UEA ind. běžný rok		13 233		pohledávky	
Příspěvky UEA ind. bud. rok		42 397		UEA subkonto	-53 693
Platby UK na běžný rok		1 670			0
Platby UK na budoucí rok		140 890		pohledávky celkem	-53 693
Platby ILEI a pedagog. komise		300		<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>-115 488</i>
Úroky z účtů	17 000	22 396	17 000	ostatní majetek ČES	
Virtuální adresa		0		drobný majetek v ceně pořízení	211 022
Služby svazu		180		knihy v libroservu (inventura)	294 544
				ostatní majetek ČES celkem	505 566
Příjmy celkem	130 500	386 869	162 000	<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>159 029</i>
				závazky	
Výdaje	pl.2024	sk.2024	pl.2025	UEA subkonto	0
Starto tisk	24 000	21 773	24 000	platby pro UEA	30 710
Starto distribuce	20 000	11 374	17 000	závazky k členům	0
Konference a sjezdy	54 300	73 604	54 300	závazky celkem	30 710
Činnost klubů a sekcí bez PS	3 000	6 360	5 000	<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>0</i>
Provoz ČES, internetové služby	2 500	10 700	11 000	účelově vázané prostředky	
Jízdné funkcionáři	4 000	1 753	4 000	fond Tilio	27 392
Přísp. na stravné za schůze	1 000	750	1 000	fond ediční	12 660
Muzeum	15 000		15 000	fond Cigno	21 388
Libroservo nákup zboží	70 000	92 012	10 000	sekce nevidomých	20 279
Libroservo poštovné a balné	300	0	300	klub Mladá Boleslav	16 618
Kurzy esperanta	300		300	klub Ratíškovice	8 246
Příspěvky UEA ind. běžný rok		11 965		pedagogická komise (ILEI)	6 288
Příspěvky UEA ind. bud. rok		0		klub Havířov	3 052
Platby UK v běžném roce		1 670		klub Písek	2 673
Platby UK na budoucí rok		140 890		klub Česká Lípa	2 215
Platby ILEI a pedagog. komise		0		klub Benešov	1 557
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 268	1 500	klub Tábor	1 314
Kolektivní členství v EEU	1 300		1 300	klub Přerov	1 366
Blahopřání, kondolence	2 000	1 674	2 000	klub Karlovy Vary	1 337
Poplatky		0		klub Opava	1 079
Daň z úroku	3 800	4 586	3 800	klub Vítkovice	992
Nový majetek	10 000	1 128	10 000	klub Šumperk	641
				klub Hranice	624
				klub Ústí nad Labem	542
				celkem	130 263
Výdaje celkem	213 000	381 507	160 500	<i>změna vůči 31.12.2023</i>	<i>0</i>

Preparoj por la kongreso



Loka Kongresa Komitato (LKK) konsistas el jenaj personoj: Jiří Tomeček (prezidanto), Libuše Hýblová (vicprezidanto, ĝiĉetoj), Milan Kolka (sekretario, kongresejestro), Andrea Švubová (kasisto), Miroslava Tomečková (sponsoroj, partneroj), Vratislav Hirš (loĝiga servo), Jiří Caletka (kontaktoj kun amaskomunikiloj), Josef Kalčík (sociaj retejoj), Tomáš Břicháček (kontaktoj kun landaj aŭtoritatoj), Marek Blahuš (kontaktoj kun lokaj aŭtoritatoj), Leonarda Chaloupková (artaj aranĝoj), Jana Zigal (ekskursoj), Paulína Jalakšová (junulara programo), Monika Kimáková (infana kongreseto), Vlasta Piščíková (voluntuloj, helpantoj), Miroslav Malovec (Kongresa Kuriero), Petr Javorík (teĥniko, mobil-aplikaĵo).



Studenta manĝejo

Januare LKK renkontiĝis en Brno kune kun la Kongresa Fako (Dorota Rodzianko, Peter Baláž, Sonja Zaretskaia) por ekkoni la lokojn kie la kongreso okazos.

Vendrede la 24-an de januaro 2025 la LKK-anoj renkontiĝis kun reprezentantoj de kunlaboranta organizo Brno Convention Bureau, vizitis la Mendel-universitaton kaj lokon kun planata infana kongresejo (lernejo por handikapitaj infanoj) kaj traktis en konferencejo de hotelo Bobby Hall pri la jam faritaj kaj la farotaj laboroj.

Sabate matene alvenis tiuj LKK-anoj, kiuj ne loĝis en la hotelo, kaj ĉiuj komune trarigardis salonojn de la hotelo, kie okazos programoj, koncertoj, teatroj. Poste ili transiris al la Mendel-universitato (kvaronhora promeno), kie ili konatiĝis kun ĉambroj servontaj kiel prelegejoj. Antaŭ la pordo ili poste fotografis sin.



Salono Zamenhof

Post tagmanĝo en proksima stila restoracio Chatrč ili trairis la ĝardenon de vilao Tugendhat kaj foriris al la urbocentro por rigardi la urbajn vidindaĵojn. Kaj denove revenis en la hotelon Bobby Hall por pritrakti la kulturen programon dum la kongreso.

Dimanĉe la diskutado daŭris ĝis tagmanĝo, poste ĉiuj forveturis hejmen.

Miroslav Malovec

Aperis Dua Bulteno

<https://uk.esperanto.net/2025/duabulteno>

RAPORTO PRI AGADO de ĈEA

prezentita dum konferenco de ĈEA 2024 en Česká Třebová

Kovilo de ideoj: Dum la konferenco de ĈEA 2023 en Prudká komitato apelis je membroj skribi, kio estas necese fari alie, nove aŭ pli bone. La detala raporto pri kolektitaj demandoj oni aperigis en STARTO 3/2024.

Enketo pri la allogeco de eventoj. Dum la konferenco ne revenis sufiĉe da enketdemandiloj kaj kompreneble estas interesa ankaŭ opinio de homoj, kiuj ne venis kaj regule ne vizitadas niajn aranĝojn. Do ni sendis demandilojn al ĉiuj membroj, sed respondis neniuj. Estas malfacile plibonigi ion, se homoj ne diras, kio ĝenas ilin.

Komuna konferenco kun esperantistoj el Germanio. Finfine komitato proponis komunan renkontiĝon nur en la jaro 2026, ĉar en la jaro 2025 okazos UK en Brno kaj aŭtune nia kongreso, kie ni elektos novan estraron de la Asocio.

Brno kiel loko por 110-a Universala kongreso en la jaro 2025. Ni akiris la celon kaj ni preparis Unuan Bultenon. Ĝian ekzempleron ricevis ĉiu partoprenanto de la konferenco ĈEA 2024. Dum Universala kongreso en Aruŝo (Tanzanio) ni sukcese prezentis nian landon kaj surloke ni kolektis pli ol cent aliĝilojn. Estis starigita Loka kongresa komitato (LKK), en kiu laboras dek sep membroj.

Kondiĉoj por okazigo de hibridaj (fizikaj kaj retaj) kunvenoj. Ni elektis platformon *meet.jit.si*, ĉe kiu regule kunvenadas komitato kaj LKK-anoj kun Kongresa Fakto de UEA, ankaŭ retaj kursoj de **Esperanto por komencantoj** (gvidas Milan Kolka el Brno) kaj por reta **BABILADO** (trejnado de progre-

sintoj). Kun tio estas firme ligita plua postulo el Prudká - trovi eblecon, kiel povu voĉdoni membroj, kiuj fizike ne partoprenos la aranĝon.

Membrobazoj: en la jaro 2023 havis la asocio 400 membrojn, en 2024 nur 370 membrojn; en ambaŭ jaroj venis 6 novaj membroj, sed 7 membroj mortis, 5 rezignis pri la membreco kaj 24 ne pagis kotizojn.

Mastrumado: enspezoj en 2024 estis 386 869 Kč, elspezoj 289 202 Kč, profito estis 97 667 Kč. En la ĈEA-konto estas 514 653 Kč.

E-klubo Benešov – la anoj kunvenadas ĉiun paran merkredon, ĉiun malparan ĵaŭdon du esperantistinoj, aninoj ankaŭ de la praga E-klubo, vizitadas tiun ĉi. Oktobre 2023 oni aranĝis prelegon pri Esperanto en Urba biblioteko Benešov. La anoj partoprenas en diversaj aranĝoj de aliaj kluboj (*L. Chaloupková*).

E-klubo Brno – La kunvenoj okazadas ĉiusemajne merkrede, foje persone en klubejo, foje rete. La retaj kunvenoj estas registrataj kaj troveblaj je jutubo. La klubo kunlaboras kun pola E-klubo Gliwice. Oni preparas prelegojn pri diversaj interesaj temoj. Printempe 2023 Milan Kolka gvidis E-kurson - finis 3 personoj kaj retan kurson kunlabore kun ĈEA – finis 6 personoj. Ambaŭ kursoj okazis laŭ lernolibro *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček. La klubanoj partoprenas diversajn E-aranĝojn, eĉ eksterlandajn (109-a UK en afrika Aruŝo). Publikado: Mir. Malovec: Poŝtvortaro e-ĉ kaj ĉ-e, eldonis KAVA-PECH, Oldřich A. Fischer: El mirinda mondo de kakttoj, propra eldonaĵo.

Kunlaboro kun Moravia Landa Biblioteko: la 19-an de marto 2024 ĝi akceptis librojn kaj ĵurnalojn en nombro de 5000 eroj, ĝis nun lokigitaj en loĝejo de Mir. Malovec (*M. Kolka*)

E-klubo Amikeco Česká Třebová – la anoj kunvenas neregule. Du anoj preparis kunlabore kun ĈEA konferencon en Česká Třebová, 27.-29.9.2024, je adreso: Domov mládeže Střední škola technická a dopravní, Habrmanova 1540. (*I. Bauerová*)

E-klubo Havířov – la klubanoj kunvenadas en diversaj societaj ejoj kaj ofte kune vizitadas kulturajn ekspoziciojn de fotoj, bildoj kaj aliaj artefaktaĵoj. Junie 2024 oni aranĝis Esperanto fajron en bela naturo ĉe Aerodromo Josef Hoza, kun ovofritaĵo kaj kolbasetoj (*Z. Heiser*)

E-klubo Karlovy Vary – la anoj kunvenas neregule. Unu klubano partoprenis ŝakturniron „Esperantistoj“ je platformo leeches.com (*M. Bloudek*)

E-klubo de doktoro Hradil, Mladá Boleslav – Oni organizas ĉiusemajne kunvenojn malfermitajn ankaŭ por publiko en Komunuma centro Klementinka. Publikado: Legaĵoj XIII. kaj XIV., propra eldonaĵo. Artikoloj en E-ĵurnaloj. Sumoo legado – aktivas 15 legantoj. Prelegoj: por publiko en Urba Biblioteko pri vojaĝado kun Esperanto. Kunlaboro kun amatora aktorino St. Hošková, prezentanta (en la ĉeĥa) tekstojn de esperantistino-aktorino Eva Seemannová pri iamaj signifaj ĉehinoj. Reta adreso: www.labutipirka.cz – E-artikoloj, kantoj, prelegoj (*J. Drahotová*)

E-klubo Olomouc – la klubanoj kunvenadas ĉiujaraŭde posttagmeze, dediĉas sin al traduko de E-tekstoj kaj aŭskultado de retaj E-prelegoj, partoprenas en aranĝoj de aliaj kluboj (*J. Machačík*)

E-klubo Opava – laŭleĝe la klubo ekzistas kun 8 membroj, fakte en Opava estas nur 2 klubanoj, kiuj de tempo al tempo kunvenadas, la aliaj vivas ekster la urbo, eĉ fremdlande. Laŭ sia sanstato unu ano vizitas E-konferencojn de ĈEA (*VI. Kočvara*)

E-klubo Ostrava – aprila 2024 vizito de redaktorino de Ĉeĥa Radio Ostrava en la klubejo kaj registrado de interparolo pri Esperanto, aprila ĉeesto de anoj en e-mentala aranĝo Ĝuu Esperanton, maja aranĝo de geedzoj Suchánek – *ovofritaĵo* en Frýdlant nad Ostravicí – 14 anoj, aŭgusta ĉeesto de unu anino ĉe Uko en afrika Aruŝo, julia „kunveno“ de ostravaj klubanoj kaj aliaj esperantistoj ĉe sepulto de neatendita forpaso de Jaroslav Suchánek (*L. Němec*)

E-klubo La Ponto Písek – la klubo ne aranĝas kunvenojn pro alta aĝo de la klubanoj, sed daŭre kulturas kontaktojn inter ili. La prezidantino de la klubo prizorgas informajn mediojn, helpas ĉe preparo de novaj retpaĝoj de E-muzeo en Svitavy, prilaboras ciferecigadon de arkivaj materialoj, preparas kelkajn programojn por E-klubo de Prago. Unu klubano efektivas registradon de E-artikoloj por nevidantoj por ĵurnaloj Revuo Esperanto kaj Monato. (*P. Dvořáková*)

E-klubo Praha – Junie 2024 efektiviĝis translokiĝo de E-klubejo *Ve Smečkách* al nova adreso *Revoluční 5*, septembre okazis unua kluba renkontiĝo en la nova klubejo. Ĉiun neparan ĵaŭdon pasas klubaj kunvenoj kun interesa programo – prelegoj je diversaj temoj, kantado ĉe gitaro aŭ ukulelo, prezentado de lumbildoj kaj rakontado pri vojaĝoj eksterlanden, Zamenhoftago ĉe E-ŝtono, antaŭkristanska kunveno en la klubejo, maja babilado kun verkisto Martin Petiš-

ka pri verko de lia patro Eduard kaj de li, prezento de noveldonita, en Esperanton tradukita libro Golemo, septembra prelego de ukraina fotografo kaj vojaĝanto Evgen Kovtonjuk pri UKo en Aruŝo. Trifoje jare la prezidanto kompilas kaj eldonas kluban Bultenon. (*T. Břicháček*)

E-klubo Prostějov – la klubaj kunvenoj pasas ĉiun jaŭdon en nova klubejo sur placo de T. G. Masaryk n-ro 1. Dum la jaro oni sendis al klubanoj, anoj de proksimaj kluboj kaj distrikta preso kaj Starto informojn pri kluba agado, la klubanoj partoprenas aranĝojn de ĉirkaŭaj E-kluboj. Ili organizis propran aranĝon okaze de 115-a datreveno de la E-klubo en Prostějov, partoprenis 6 esperantistoj, la klubo havas retpaĝojn kun informoj pri kluba agado kaj fotoj de diversaj aranĝoj (*J. Liška*)

E-klubo Ratiškovice – la klubo ne organizas regulajn kunvenojn. Januare 2024 oni efektivigis jarkunvenon kaj junio ĉeeston ĉe „Falĉo-tagó“. Decembre 2023 geedzoj Vyšinka kunlabore kun E-klubo Svitavy organizis Marcipanan Kristnaskon en E-muzeo Svitavy, junio geedzoj Melichárek partoprenis ekskurson al Orlica Montaro kun svitavaj klubanoj (*J. Melichárková*)

E-klubo Svitavy. Klubo de geamikoj de Esperanto – memstara jura subjekto. Oni efektivigis 41 aranĝojn, kelkajn pli ol unu tag-daŭrajn, eĉ ekskursojn eksterlanden, Marcipanan Kristnaskon kaj Paskofeston, oni propagandas Esperanton ĉe prelegoj en lernejoj bazaj kaj mezlernejoj dum Tago de lingvoj, Tago de muzeoj, prelegoj en Hejmo de pliaĝuloj, paroĥejo. Instruisto sinjoro Richtr, kunlaborante kun la klubanoj, organizas prelegojn – Vojaĝaj vesperoj, pro tio oni aĉetis jam duan data-

projektilon. Krom klubaj kunvenoj okazas tri E-kursoj. Ĉiujare oni kompilas aktualan fotolibron-kronikon de la klubo. La klubo havas proksimajn rilatojn al la urba muzeo kaj informas publikojn urban kaj Esperantan pri sia agado, oni havas siajn FB-paĝojn kaj interretan paĝaron, s-ino Čumová zorgas pri muzea biblioteko kaj Libroservo. (*L. Dvořáková*)

E-klubo Třebíč – la klubo ne havas kunvenojn, sed oni prizorgas ĉiujaran organizon de origine nomata *Somera Esperanto Tendaro* en Lančov, nuntempe *Somera Tendaro de Esperanto kaj aliaj mondaj lingvoj*. Okazas nur kursoj de aliaj lingvoj, ĉar por Esperanto oni havas nek interesatojn, nek instruistojn. La organizantoj kelkfoje dum la jaro kontrolas la tendaron. Komence de aŭgusto ĉiujare oni organizas finsemajnan kunvenon de iamaj tendaranoj. (*O. Lacinová*)

Blaga-ŝerca grupo E-mental' - organizis tre sukcesan aranĝon *Ĝuu Esperanton* en Brno, Pardubice, Ostrava, Česká Třebová, Šumperk, Svitavy kaj Benešov, januare festis 25 jarojn de E-mental' en Velké Pavlovice, februare vizitis bestĝardenon, kie oni protektas hipopotaminon Emička, maje tre sukcese partoprenis pragan aranĝon "Kuro por PARAPLE" virtuale kaj persone, partoprenis en praga aranĝo Briko - Helpu helpi; la anoj aĉetis 40! brikojn kaj ornamis ilin per surskribo ESPERANTO (la aranĝon vizitis eĉ prezidento Petr Pavel), vojaĝis al Graz (pli poste Grazanoj vizitis E-mentalanojn en Prago), organizas aliajn aranĝojn, dum kiuj oni konversacias en Esperanto kaj trejnas ĝin ĉe diversaj amuzaĵoj; per sia agado faras propagandon de Esperanto por publiko. (*V. Piščíková*)

E-klubo Pardubice-Rondeto de Dr. Schulhof + AEH – Ambaŭ organizaĵoj tuŝapude kunlaboras. La tutan jaron prezidantino de la klubo transmetadis E-librojn kaj materialojn de subtegmento en laborĉambron, ordigis ilin kaj kompilis liston de ili – helpis klubanoj. La liston oni sendis al E-biblioteko en Svitavy. Interesatoj povas mendi – laŭ la listo – iun ajn libron. La kunvenoj de ambaŭ organizaĵoj pasas en loĝejo de la prezidantino dufoje monate. Marte 2024 efektiviĝis aranĝo de E-mental’kaj la klubo – Ĝuu Esperanton, maje la klubanoj partoprenis en aranĝo Multkultura Semajno en Příhrádek. Jam de longe oni strebas por lokigo de tabuleto kun Esperanta teksto sur arbon, kiu iĝos Esperanto-arbo. Oni atendas decidon kaj konsenton de urba konsilantaro. Ĉiunmonate la AEH eldonas kaj dissendas (eĉ eksterlanden) Informilon kaj 4 foje jare ĝian aldonajon Antaŭen – redaktoroj estas M. Kosnarová kaj L. Srbová. Kontribuoj de interesaj artikoloj estas bonvenataj. La klubanoj helpis forigi lignajn budojn en ĝardeno de la prezidantino por konstruigi pergolon kun firma tegmento por estontaj ĝardenaj E-kunvenoj. La rondeto kunlaboras kun Jiří Altior, malproksima parenco de Dr. Schulhof, fondinto de Instituto de renesanca heredaĵo. (*M. Kosnarová kaj L. Srbová*)

Katolika sekcio IKUE – de 17.6., laŭ postulo de la sekcio – ĝi estis forigita de societa registro kaj iĝis sekcio de ĈEA, sekcio sen jura subjektiveco. La sekcio havas nun 24 membrojn – la nombro malaltiĝas pro forpaso de la anoj, pro malbona sanstato kaj simile. De la jaro 1991 la sekcio eldonis kvaronjaran paperan ĵurnalon Dio Benu, kiu aperas

jam 34 jarojn. De la jaro 2023 ĝi aperas interrete. De komenco ĝis nun redaktas ĝin M. Šváček, prezidanto de la sekcio. Oni vane serĉas homon por plua agado de la sekcio kaj por redaktado kaj eldonado de la nun reta Dio Benu. La anoj de la sekcio ne kunvenadas persone, sed komunikas rete, ankaŭ partoprenas en klubaj kunvenoj de E-klubo Přerov. La retpaĝaro www.ikue.org/cz enhavas numerojn de Dio Benu, arkivon de la ĵurnalo de la jaro 1991, Praktikan Kompendion kun ĉiuj kantoj kaj melodioj el Dio Benu, diversajn artikolojn, enhavon de ĵurnalo Espero Katolika. (*M. Šváček*)

Sekcio de nevidantoj kaj duonblinduloj – LIBE. Ne efektiviĝas personaj kunvenoj, tamen la anoj de la sekcio aktivas. Geedzoj Jelínek – sinjoro Jiří – redaktas ĵurnalon Aŭroro, kiu estas eldonata en Brajla skribmaniero, laŭlegante registras geedzoj Karaš. Krome sinjoro Jelínek kontrollegas la ĵurnalon de LIBE „Esperanta Ligilo“, kiun presas praga biblioteko kaj presejo. Fine de la jaro 2024 finiĝis eldonado de la ĵurnalo Aŭroro pro financaj malfacilaĵoj kaj ankaŭ foresto de la abonantoj. La sinjoro estas komitatano de LIBE, la anoj komunikas per interreto. La anoj de la ĉeĥa sekcio planas 2 kunvenojn de blindaj kaj duonblindaj esperantistoj dum la UKo en Brno 2025. (*J. Příborský*)

Pedagogia komisiono. Milan Kolka gvidas retan E-kurson por komencantoj; skriban E-kurson gvidas M. Tomečková – venis 5 aliĝiloj. (*J. Melichárková*)

Traduka grupo. Ĝi aktuale ne funkcias, sed Pavla Dvořáková planas prepari seminarion je temo „Utiligo de artefaritaj tradukiloj kaj artefarita intelekto“ lige al la sama temo dum KAEST 2024. En propono estas preparo de diversaj materi-

aloj, antaŭ ĉio ĉiĉeronaj aŭ aliaj, laŭ postuloj de organizantoj de UKo Brno 2025. (P. Dvořáková)

Grupo por ciferecigado. La kvar kunlaborantinoj ciferecigas iamajn ĵurnalojn – Praga Bulteno, Verda Familio (de Mnichovo Hradiště), Bulteno Haná, Jeseníky; Bulteno Laborista Ligo en Ĉeĥoslovakio; Verda Voĉo el Doksy. M.Malovec kompilis novan poŝvortaron (vidu informon pri E-klubo Brno) krom alie por UKo Brno, por supozata pli granda intereso pri Esperanto en nia lando. (M. Malovec)

Laŭ raportoj de Jiří Tomeček, Andrea Švubová kaj Leonarda Chaloupková prilaboris Miroslav Malovec

KER-EKZAMENOJ EN 2025



Toronto - 11a de julio

La unua ekzamendato estas la 11a de julio, komence de la [Dulanda Kongreso](#) en Toronto (Kanado) kaj fine de la ĵus antaŭa [Nord-Amerika Somera Kursaro \(NASK\)](#). Paralele kun la ĉeestaj ekzamenoj eblos solvi ankaŭ rete la testojn kaj tiel tra la tuta amerika kontinento kaj en la proksimaj tempozonoj oni povos labori en komforta, dumtaga temp-intervalo. En tiu tago okazos ekzamenoj je niveloj: B1, B2 kaj C1.

UK, Brno - 1a de aŭgusto

La dua ekzamensesio okazos dum [UK 2025](#), la 1an de aŭgusto. Ankaŭ en tiu tago okazos kaj ĉeestaj kaj retaj ekzamenoj, sed nur en tiuj niveloj, en kiuj aliĝos ĉeeste kaj rete sume

minimуме 12 kandidatoj. La proponataj niveloj estas B1, B2, C1 kaj C2. Pro la tempozono tiuj ekzamenoj taŭgos precipe por eŭropaj kaj aziaj kandidatoj.

IJK, Indonezio - 14a de aŭgusto (provizora)

Krom la du sesioj jam konfirmitaj, estas ankaŭ planata papera C1-ekzameno por homoj, kiuj partoprenos la [81-an Internacian Junularan Kongreson \(IJK\)](#) en Indonezio. Interesiĝantoj nepre skribu al ijk2025@tejo.org ĝis la 1a de majo, ĉar necesas minimume 10 kandidatoj por ke la ekzameno povu okazi.

Intervjuoj

La parolaj ekzamenoj havas du partojn: aŭdkomprenajn testojn kaj parolajn antaŭkomisionajn ekzamenojn. La kandidatoj, kiuj ekzameniĝos rete, devos trapasi ankaŭ la parolan intervjuon rete, la kandidatoj de la ĉeestaj ekzamenoj povos elekti el inter ĉeestaj aŭ retaj ebloj.

Aliĝ-limdatoj

Al la ekzamenoj necesas aliĝi pere de la [formularo](#) ĉe edukado.net. La limdato por aliĝi kaj pagi la kotizojn estas ĉirkaŭ je 6 semajnoj antaŭ la ekzamentago (1a de junio por Toronto, kaj 15a de junio por UK).

Provtestoj - prepariĝo

Por tiuj, kiuj ne scias decidi, je kiu nivelo ili estas, ni disponigas [senpagajn provtestojn](#), kiujn oni solvu rete.

Por trovi pli detalajn informojn vizitu la [retpaĝaron pri la KER-ekzamenoj](#) aŭ skribu al la organizantoj per ker-ekzamenoj@edukado.net.

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 1214

EK Prostějov

En decembro ni vizitis Esperanto-Muzeon en Svitavy.



En januaro vizitis nin Marian Wolny, prezidanto de E-klubo Gliwice, por ligi kunlaboron.



La 6-an de februaro 2025 en jarkunveno partoprenis 7 membroj kaj prezidanto de EK Olomouc. La kunveno elektis komitaton: Jaroslav Liška (Prezidanto kaj kasisto), Pavel Smělý (bibliotekisto) kaj Martin Pokorný (revizoro de kontoj).


Laborplano por 2025: propagandi Esperanton en nia urbo, precipe inter junaj homoj, en la distrikta gazetaro informi pri nia agado, en nia klubejo okazigi diversajn aranĝojn kaj inviti gastojn, partopreni diversajn aranĝojn enlande kaj eksterlande, ĉefe dum UK en Brno, kunlabori kun najbaraj kluboj, kunbindi kolektojn de gazetoj kaj fine de jaro prepari Silvestran feston.

Jaroslav Liška

Babilado de ĈEA

Por helpi al tiuj, kiuj volas dum UK bone paroli kun eksterlandaj samideanoj, ĈEA preparis serion de konversaciaj retaj renkontoj, nomataj Babilado. Sube estas temoj, kiuj estis traktataj. Ĉu vi kapablus pri tiuj temoj diskuti, ekz. en via klubo?

- 3.9. Someraj ŝatokupoj
- 10.9. Familio
- 17.9. Aŭtuno kaj vetero
- 24.9. Renkontiĝoj – familiaj, lernejoj, sportaj
- 1.10. Kion mi legas
- 15.10. Domo, hejmo, loĝado
- 22.10. Mia hobbio
- 29.10. Rutinoj – plezuraj aŭ teruraj
- 5.11. En la naturo
- 12.11. Trafiko ne nur urba
- 19.11. Kion mi vidas dum promenado
- 26.11. Advento
- 3.12. Donacoj – kiel elekti la plej bonan
- 10.12. Mia semajnfino
- 17.12. Kristnasko
- 7.1. Vintraj festotagoj – kiel mi pasigis ilin
- 14.1. Silvestro
- 21.1. Vintro
- 28.1. Kongresoj, ĉefe UK
- 4.2. Karnavala periodo – senco, tradicioj
- 11.2. Vivo kun Esperanto
- 18.2. Internacia tago de Pluto
- 25.2. Kiam vi esperantistiĝis, kial?
- 4.3. Libroj
- 11.3. Geokaŝado
- 19.3. Nekutimaj vivmanieroj
- 25.3. Pri kio vi revas



Ankaŭ niaj fervojistoj preparis similan ekzercon ne nur por siaj membroj

www.esperanto.cz/cs/akce/jazykove-procvicovani-cefea-1536.html

TEJO AKTIVAS

Tutmonda Esperanto-junularo estas ĉiam aktiva:

■ TEJO kaj Konsilio de Eŭropo organizas **studsesion en Budapeŝto**, februare 2025

■ La 10an de decembro 2025, okazos la **70-jariĝo de la Rezolucio de Montevideo**. Kiel kontribuo al tiu grava evento, TEJO volas krei filmetojn pri la rilatoj inter Esperanto kaj Unesko. En unu el la filmetoj homoj el la tuta mondo legos la **Manifeston de Ŝventoj**.

■ La Kataluna Esperanto-Junularo invitas al sia junulara Esperanto-aranĝo, **de la 20-a ĝis la 23-a de februaro 2025 en Olot (Katalunio)! RenKEJtiĝo** estas plurtaga aranĝo por junaj esperantistoj kaj de Katalunio kaj de ĉie.

■ IEJ anoncis la lokon de la **48-a Internacia Junulara Festivalo**. Ĝi okazos dum la Paska semajno en **Torricella di Magione (PG)**, ĉe la mojosa Lago Trasimeno, **de la 17-a ĝis la 22-a de aprilo 2025**.

■ La **81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** okazos de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2025 en Cisarua, Indonezio!

■ **Nia aŭguristino**, kiu spertas pri okcidenta stelaŭgurado, esploris la kosmajn energiojn kaj studis la movojn de la planedoj por ni: malkovru kion la universo rezervis por ni kaj kiel ĝi influos novembron por ĉiu signo de la zodiako!



Ankaŭ en Afriko floras Esperanto

EL ESPERANTUJO

■ **La 47-a Esperantologia Konferenco (EK) de CED**, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) okazos kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno, Ĉeĥio (26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto 2025).

■ **SENPAGE ELŜUTEBLAS** LA DECEMBRA (2024) KAJ JANUARA (2025) NUMEROJ DE LA REVUO ESPERANTO uea.org/revuoj.

■ **Esperanto en Burundo** rapide evoluas, eĉ ministrino portas Esperantan T-ĉemizon. Esperanto-Asocio en Burundo ANEB ricevis ŝancon liveri esperantan trejnadon al indiĝenaj instruistoj. Loka Esperanto-centro havas propran bibliotekon, kvankam kun nemultaj libroj.

■ **Fabellibro** aperis kaj jam deŝuteblas, legeblas ĉe la Hungara Elektra Biblioteko. La titolo de la volumo estas: *Imperio de Feino Hellas*. Ĝia aperejo estas: <https://mek.oszk.hu/25800/25890>

■ **Eszter (Stela) Besenyi-Merger**, 37-jara denaska esperantistino el Hungario, estas elektita kiel la **Esperantisto de la Jaro 2024**. Legu la gazetaran komunikon en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2024/12/jaro-8/>

■ Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kore invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu okazos unuafoje en **Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025!** La ĉefa temo de la kongreso kaj ties simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado**.

■ Diplomalaboraĵo de Vitor Tagor pri **maŝintradukado**:

http://www.eventoj.hu/steb/ingxenierado/komputado/auxtomataj_tradukiloj.pdf

Karel Emanuel Macan

(1858-1925)

Stanislav Motl, redaktoro de Ĉeĥa Radio, elsendis la 3-an de februaro 2025 programon *Slepý muž, který slepé učil vidět* (Blinda viro, kiu blindulojn instruis vidi) pri blinda komponisto kaj esperantisto Karel Emanuel Macan, kiu forpasis la 6-an de februaro 1925, do antaŭ 100 jaroj.



Macan, unu jaron pli aĝa ol Zamenhof, naskiĝis la 25-an de decembro 1858 en Pardubice, kie lia patro Vojtěch Macan, italdevena, laboris kiel fervoja konstruisto. Kiam ili transloĝiĝis al Prago, Emanuel komencis vizitadi realgimnazion. En sia 12-a jaro li trovis kartoĉon por fusilo de sia patro, ludante batis ĝin per martelo kaj unu splito trafis lian dekstran okulon. Oni devis la okulon elpreni sen narkozo, do la knabo terure suferis. Kiam li havis 17 jarojn, li preteratentis obstaklon, kiu puŝiĝis kontraŭ lia maldekstra okulo. Malgraŭ tio li ne rezignis, kaj volis studi kemion. Sed dum la studado la okulo estis ĉiam pli malforta, ĝis li komplete troviĝis en mallumo. Antaŭ depresio savis lin muziko, kiun li komencis studi (orgenon ĉe František Skuherský kaj komponadon ĉe Zdeněk Fibich).

En 1807 Alois Klar (1763-1833) fondis en Prago unuan lernejon por blinduloj, kiu ĝis nun nomiĝas Instituto Klar. En 1890 la instituto proponis al Macan fariĝi tie instruisto. Li trairis kurson de instruistoj por blinduloj en Vieno kaj en 1891 komencis instrui en Klar. Li lernis

kaj instruis brajlan skribon, tradukadis librojn el la franca al la ĉeĥa. Inter blinduloj li propagandis Esperanton kaj radio-elsendojn. Li fondis societon Ĉeĥa Blindula Gazetaro, redaktis ĉeĥlingvan brajlan gazeton Zora kaj ĝian esperantlingvan version Aŭroro. Li disvastigis la brajlan bibliotekon de la instituto al 2960 volumoj (inter ili 114 en Esperanto), kiuj fariĝis bazo de Biblioteko K. E. Macan por blinduloj. En 1896 li konatiĝis kun sia vivkunulino, sed ili geedziĝis nur en 1919.

M. Malovec
bildo el Vikipedio

Zamenhof-tago

Ĉirkaŭ la 15-a de decembro ĉiujare okazas Zamenhof-festoj. Tiun en Pola Instituto en Vieno la 14-an de decembro 2024 partoprenis tri membroj de EK Brno (Milan Kolka, Miroslav Malovec, Marek Pavlovský). Unue dudeko da personoj kolektiĝis ĉe Zamenhof-busto en Karlsplatz, poste piede ili iris ĝis la instituto por aŭskulti prelegojn. La estro de Esperantomuzeo Bernard Tuidar prezentis la muzeon kaj precipe programon de ciferecigado de dokumentoj. Franz-Josepf Geidel donis konsilojn, kiel akiri kaj teni novulojn. Videofilmeto de Mirka Tomečková prezentis sur ekrano la venontan kongres-urbon Brno. *mm*



INFORMO PRI RETA ESPERANTO-KURSO

De oktobro 2024 ĝis januaro ĉi-jara okazis reta E-kurso, gvidata de Milan Kolka el Brno. Li instruis laŭ lernolibro *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček. La lernantoj de ĉiuj aĝoj – de 19-jara junulo ĝis sinjoro emeritulo – kunvenadis ĉiumarde vespere.

La kurson finis 4 gelernantoj.

Nelonge antaŭ finiĝo de la kurso okazis io nekutima – ĉiuj 4 kursanoj, kiuj hazarde loĝas aŭ en Prago, aŭ proksime de ĝi, okazigis personan kunvenon iun posttagmezan sabaton en ĉarma kafejo Fanta en la 1-a etaĝo de ĉefstacidomo de Prago. Alvenis ankaŭ aninoj de E-klubo Benešov. (Por pli flua interkompreniĝo oni uzis ĉeĥan lingvon).



La kunveno estis sincera, ĝoja. Kaj kio estas speciale ĝojiga – la gelernantoj esprimis deziron daŭrigi en Esperanto per memstudado. Unu studento jam vizitis pragan E-klubon, la alia planas viziti E-klubon de Benešov.

Karaj gelernantoj, restu fidelaj al Esperanto kaj ĝojigu vin en diversaj E-aranĝoj en Esperanto-familio!

LChal

EK Ostrava-Poruba La arboj Milenia

Dum la tagoj 8-an ĝis 12-an de aprilo 2002 aranĝis komune geesperantistoj el Poruba kaj EK Vítkovice la ekspozicion "El historio de Esperanto en Ostrava" omaĝe al la 50-a datreveno de malkovro de monumento "Esperanto" al J. A. Komenský en urbo Ostrava.

Dank' al s-ino Lud. Tesařová kaj ŝia sukcesa organizado – kiel unuaj en nia urbo estis marde 9. 4. 2002 plantitaj du arboj Milenia.



Ĉeestaj geesperantistoj plantis "La arbon Esperanto", duan arbon "La arbon Milenia", plantis gestudentoj el Gimnazio Olga Havlová en Poruba. La solenan atmosferon esprimis per belaj vortoj s-ro direktoro de la gimnazio kaj gestudenta konata kanthoro subtenis ĉi solenon. La reciproka renkonto memoris la 410-an datrevenon de la naskiĝo de J. A. Komenský.

La planto de la arboj (tilioj) estis finita en amika kunsido, ĉeestis prezidantino ĈEA Věra Podhradská kaj delegitoj el proksimaj esper. kluboj. L. Klegová dankis al ĉiuj ĉeestintoj kaj gehelpantoj.

L. Klegová

Pri la arbo jam skribis V. Podhradská en Starto 2/2002, p. 35-36

La Esperanto-Muzeo en mia koro

Alessandra Madella

En la malnova kampuso de Zaozhuang-Universitato en provinco Shandong de Ĉinio troviĝas Esperanto-Muzeo. Ĉe la enirejo, post la fama frazo de Mao Zedong, ke indas instrui Esperanton, bonvenigas nin la statuo de Ludoviko Zamenhof, antaŭ kiu ofte vizitantoj donacas al la Muzeo siajn valorajn Esperantaĵojn.



Verdaj vandoj kun bele organizitaj memorindaĵoj en montrofenestroj pruvas la gravecon de Esperanto en Ĉinio kaj en la mondo. Ofte ĉiĉeronas S-ro Semio (Sun Mingxiao) mem, la fondinto de la Muzeo, kies oficejo troviĝas tute proksime. Dank' al lia gvidado, vizito ne estas nur sinsekvo de vidindaĵoj, sed ankaŭ maniero kompreni la ĝeneralan staton de la jam akiritaj konoj pri Esperanto-studoj inter ĉinaj Esperantistoj kaj la eblajn direktojn de la ankoraŭ farindaj esploroj sur la fono de la jam faritaj. Mi mem havis okfoje la bonŝancon aŭdi S-ron Semio ĉiĉeroni tra la Muzeo al gastoj de la plej malproksimaj provincoj de Ĉinio aŭ de eksterlando—

kiel S-ro Duncan Charters – kaj respondi al iliaj scivolemaj demandoj, kiuj iris de valoraj Zamenhofaĵoj aŭ Harbinaj pioniroj al la tajpmaŝino de poeto Armand Su aŭ al la oranĝsuko Mirinda. Ĉiam estis riĉiga okazo.



La muzeo nun okupas la spacojn de subtera kontraŭ-atoma rifuĝejo de la Malvarma Milito kaj utiligas ĝian konstantan malvarmetan klimaton cele al dokument-konservado. Sed, pro manko da spaco, libroj verkitaj antaŭ la dua mondmilito troviĝas en alia biblioteka ĉambro en supera etaĝo de la plej alta konstruaĵo de la malnova kampuso. Kiam la Esperanto-Muzeo translokiĝos al la nun konstruata granda biblioteko de la nova kampuso de Zaozhuang-Universitato, ĉiuj Esperanto-libroj povos finfine tie esti kune.

Tiu evoluo, reunuigante la tutan kolekton en unu loko, eĉ vide donos la senton de la seninterrompa kontribuo de Esperanto al la ĉina kaj monda literaturoj kaj kulturo ĝenerale. La pli klara konscio de tiuj kunligoj kaj la rekta alireblo al la

tuta kolekto de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio estos granda helpo al la kvalita kresko de la Esperanto-fako ĝenerale. Ankaŭ la uzo de tiuj gravaj rimedoj fare de alilokaj esploristoj iĝos multe pli facila dank' al la praktika proksimeco de la stacidomo de la superrapida fervojo, kiu en malmulte da horoj povos komforte alvenigi ilin de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj kernaj ĉinaj urbejoj kun internaciaj flughavenoj.



Se de unu flanko per tiu progreso perdiĝos la bela ĝardeno fono de la malnova kampuso, vera vojeta labirinto de fabelaj statuoj kaj elegantaj arboj por buntigi ĉiun sezonon, de la alia flanko akireblos nova majesteco, kiu verŝajne ankaŭ helpos famigi la Muzeon kaj plivastigi ĝiajn kolektojn. Certe estos konsolo por maljunaj esperantistoj tra la mondo la scio, ke iliaj amataj libroj kaj kolektaĵoj en la internacia lingvo povos pli longe vivi por vizitantoj kaj seriozaj esploristoj en tiel impon-aspekta loko, kie ankaŭ ricevos pli dignan aranĝon la memoraĵoj de elstaraj ĉinaj verkistoj kiel Hou Zhiping kaj Laŭlum (Li Shijun).

Ankaŭ familianoj de forpasintaj sam-ideanoj pli facile konsideros havigi al la Muzeo la memoraĵojn de siaj karuloj, tiel

helpante ne disperdi valorajn kaj ofte unikajn materialojn, kiuj alimaniere povus esti disvendataj aŭ eĉ forĵetataj. Kaj junaj Esperantistoj trovos sendube inspiron kaj stimulon en ĝiaj pli novigaj teknikaj rimedoj, ciferecigitaj enhavoj kaj interreta alireblo, pri kiuj jam komencis zorgi la gestudentoj revenintaj de siaj magistras studoj pri Esperantologio kaj Interlingvistiko ĉe Universitato Adam Mickiewicz de Pollando.



Certe tiuj grandaj revoj por la estonto ne devas perdi al ni la vidon de la origino de la Muzeo mem, por ĉiam valorigi ĝiajn radikojn kaj specifan identecon. Laŭ mi, tiu kerna animo troviĝas en ĝia specifa “movada” sinteno. Mi povas ilustri ĝin per du ekzemploj: la inaŭguro de la Muzeo kaj la festo por la emeritiĝo de S-ro Semio. Mi bonŝance povis ĉeesti la fondon mem de la Esperanto-Muzeo antaŭ dek jaroj, dum la Ĉina Tutlanda Kongreso gastigita de la universitato en novembro 2013. Pri la inaŭgura ceremonio mem, mi memoras la gravulojn starantajn en la placo antaŭ la enirejo por la solenaĵoj kaj la komuna fotado.

Islanda ambasadoro, filo de eminenta Esperanto-verkisto, donacis al la Muzeo

gravajn dokumentojn de sia patro pro sia granda amo al Ĉinio, kie li estis unu el la unuaj okcident-eŭropaj studentoj dum la Malvarma Milito. Tiu ceremonio ilustras kiel la Muzeo ludas esencan rolon por altiri eminentulojn kaj gajni ilian subtenon por la Universitato kaj ĝia Esperanto-agado. Kiel ofte diras S-ro Semio, la Esperanto-fako povis esti malfermata nur dank' al la ĉeesto de la Muzeo kaj al ĝia klara prezentado de la graveco de Esperanto por moderna ĉina historio al gravaj homoj kun decida povo kaj rimedoj.

Sed multe da amikaj grupetoj formiĝis por babiladi tuj antaŭ kaj post la oficiala inaŭgura ceremonio. Tiel la Esperanto-Muzeo mem energiplene fondiĝis kva-zaŭ ene de Esperantujo, kiel nehaltigebla deziro nepre paroli kun malproksimaj geamikoj kaj ĝui ĉiun momenton de la kuna ĉeesto antaŭ la denova nepra apartiĝo por la reveno hejmen.


Dum la ceremonio por la emeritiĝo de S-ro Semio, estis tre evidenta la rolo de la Studenta-Asocio kaj ĝia intima ligo kun la Muzeo. Multe impresis min, ke venis saluti lin en tiu okazo ankoraŭ junaj iamaj studentoj, kiuj nun loĝas kaj laboras tre malproksime en aliaj provincoj. Ili multe fieris, ke ili povis kontribui sub lia gvido al la konstruado de la Muzeo kaj ili konsideris tion agado, kiu donis veran sencon al iliaj vivoj. Unu el ili nun ekinstruis Esperanton al siaj gestudentoj en universitato de Hangzhou, kiu specialiĝas pri komunikiloj. Kaj kvankam ili loĝas nun tre for de Zaozhuang, ilia verda koro tute ne senkoloriĝis. Oni povas certe diri, ke la Esperanto-Muzeo estis la komenco kaj estas la daŭra inspiro de ilia agado, ĉar per ĝi ili komprenis, ke per la internacia

lingvo oni povas vere realigi konkretajn aferojn kaj sperti la ĝojon de komuna konstruado por la sama espero.

Se la nova Muzeo havos la ŝancon iĝi tute moderna kaj elstara esplor-centro, modelo por similaj institucioj en Azio kaj en la tuta mondo, mi esperas, ke ĝi samtempe neniam perdos la kapablon motivigi junajn homojn agadi por Esperanto, cele al pli bona, pacema kaj kunlaborema mondo trans ĉiuj kulturaj kaj lingvaj baroj.

Pri la aŭtorino

Alessandra Madella estas italino el Parma. Ŝi studis la japanajn lingvon kaj literaturon ĉe la Universitato Ca' Foscari de Venecio kaj la Universitato de Tokio kaj doktoriĝis pri Komunikaj Studoj ĉe la Universitato de Iowa en Usono. Ŝi longe instruis Kinhistorion kaj Esperanton ĉe la Artkolegio de Kunming kaj estas profesorino pri la samaj fakoj ĉe Zaozhuang-Universitato en Ĉinio.



Ŝi estas ankaŭ estraranino de ILEI kaj aŭtorino de libro **Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj**.

Miroslav Malovec

Lanĉo de la libro **Král Mates I. Reformátor** (Reĝo Matĉjo la Unua)

okazis je la 10-a decembro 2024 en kristnaske ornamita „Komunitní centrum Klementinka“ en Mladá Boleslav. Ne venis tiom da homoj, kiel kutime, ĉar pluraj programeroj okazis samtempe. Du knabinoj legis erojn el la libro kun legema avinjo el infana ĝardeno, anino de esperanta Rondeto Klementinka.



La libron povas la publiko trovi sur adreso www.bezvydavatele.cz, aŭ prunti en loka biblioteko.



Poste la tradukistino konatigis partoprenantojn kun aŭtoro de la libro – Janusz Korczak (1878-1942), precipe kun liaj reguloj por edukado de infanoj:

Jen ses liaj rekomendoj:

- Ne postulu de infano, ke ĝi vivu laŭ viaj imagoj, sed helpu al ĝi, ke ĝi mem trovu sian propran vojon.
- Ne atendu de infano dankemon je ĉio, kion vi faris por ĝi. Vi donis al ĝi vivon. Kiel ĝi povas al vi danki? Ĝi donos amon al siaj infanoj, danke al saĝeco de Dio.
- Klopodu ne maljustumi al via infano, por ke en maljuneco vi ne havu amaran panon. Ĉar kion vi semas, tion vi rikoltos.
- Ne solvu mem problemojn de sia infano.
- Ne humiligu! Ne moku!
- Memoru, ke la plej gravaj renkontiĝoj, kiujn homo povas travivi, estas renkontiĝoj kun infanoj. Dediĉu al ili atentemon, ĉar vi neniam scios, kiun vi renkontos en konkreta infano.

La libron „Reĝo Matĉjo“ vi povas legi en Esperanto en traduko de Tomasz Chmielik, la ĉeĥan tradukon vi povas peti ĉe Jindra Drahotová.
Notis Blanka Hužerová.



Aranĝoj en Esperanto-Muzeo Svitavy

Marcipana Kristnasko



Jam la 17-an Marcipanan Kristnaskon la svitava klubo organizis en la Muzeo de Esperanto. Preskaŭ 90 infanoj modlis figurojn el marcipano sub la gvidado de Aniĉka Vyšínková. Jiří Vyšínka denove kun Marie Čumová vendis jam pretajn marcipanajn figurojn aŭ marcipanon por hejma modelado. Ĉi tiu evento estas tre populara en Svitavy. Dum la tempo de organizado de ĉi tiu evento, kelkaj infanoj jam fariĝis paĉjoj aŭ panjoj kaj venis kun siaj infanoj por modeli. Esperantistoj el aliaj kluboj ankaŭ venis por rigardi nin. Por ĉiu kreanto, kiel ĉiam, estis preparita Memorfolio kaj malgranda donaceto.

Kreado de kristnaskaj bondezirkartoj

Sian favoron ĉe infanoj kaj gepatroj malrapide akiras ankaŭ alia antaŭ-kristnaska evento por infanoj – Kreado de kristnaskaj bondezirkartoj. Ĝis nun ĉi tien venas sufiĉe malgrandaj infanoj,

kiuj ne povas labori sen la helpo de gepatroj. Tamen ili mem elektas la koloron de la bondezirkartoj kaj memstare kreas ilian ornamadon. Ĉiujn materialojn por ili preparas Eva Karbašová, al kiu diligente helpas ankaŭ ŝia malgranda filino. Ili helpas al infanoj ankaŭ per la preso de la folio mem.



Jaro de la Serpento

La 24-a de januaro 2025 pli ol miliardo da homoj en la mondo bonvenigos la Jaron de la Serpento. Laŭ la ĉina horoskopo, serpentoj estas konsiderataj misteraj kaj saĝaj estaĵoj. Ili kapablas konservi trankvilon en ĉiu situacio kaj ne timas ajnan defion. Ĉar nia Klubo de Amikoj de Esperanto ankaŭ ne timas ajnan defion, konservas proksimajn kontaktojn kun multaj landoj de la mondo kaj klopodas disvastigi ankaŭ nian ĉeĥan kulturon kaj la urbon Svitavy, ni profitis la ofertitan kunlaboron kun la ĉina radio Tian Jing en WeChat kaj por ĝia elsendo la 28-an de januaro 2025 membroj de la klubo I. Bauerová kaj M. Sýkora, sub la reĝisorado de nia membro Li Huang, legis ĉeĥe kaj esperante la fa-



belon de Božena Němcová "Pri la blanka serpento". Ni kredas, ke ĝi same kiel ni kaj niaj infanoj, ankaŭ interesos la ĉinajn aŭskultantojn kaj, kiel kutimas en fabeloj, montros ke la bono venkas super la malbono.

M. Sýkora

Aŭtoro de nia kongresa logo

estas Vít Stanovský, grafikisto, kiu kunlaboras ĉefe kun niaj fervojistoj – ni faris komune kongresan kurieron de IFEF-kongresoj en Jablonec (2011) kaj Beroun (2022).



Miroslav Malovec



Esperanto-kursoj en Greziljono

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

2025-apr-18/27: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj por ekzamenoj kun 4 famaj instruistoj: gresillon.org/p

2025-apr-27/maj-03: BEMI-semajno (biciklaj promenoj) kaj ĥora (korusa) renkonto: gresillon.org/k

2025-jun-09/12: Ekskursoj post la kongreso de Espéranto France: kongreso2025.esperanto-france.org/postkongreso

2025-jun-30/jul-10: Maratona E-kurso kun 3 instruistoj, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m

2025-jul-11/20: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (ĉefe franclingve): <https://gresillon.org/e>

2025-jul-21/31: Renkonto de Esperanto-Familioj (REF): familioj.miraheze.org/wiki/REF_2025

2025-aŭg-09/16: Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda): satesperanto.org

2025-aŭg-24/29: Verda Naturisma Semajno kun E-kursoj: gresillon.org/n

2025-okt-24/nov-02: AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle: <https://gresillon.org/au>

Bert Schumann

Letero el Ĉinio al Starto

Mia nomo estas Sukcesa (SuXin) kaj mi estas juna esperantistino en Zaozhuang, Ĉinio. Jam de tri jaroj mi studas Esperanton en Zaozhuang-a universitato. Mi sincere volas kunhavigi mian esperantan lernsperton kun esperantistoj de la alia flanko de la mondo kaj aparte antaŭĝuas la ŝancon komuniki kun ĉeĥaj samideanoj.



En nia Esperanta fakko, eble unika en la mondo, ni ne nur lernas la lingvon, sed ankaŭ la historion de Esperanto kaj la pensojn de Zamenhof, por kompreni la spiritan valoron malantaŭ la

lingvo mem. Niaj instruistoj el Ĉinio, Italio, Japanio kaj Koreio uzas diversajn metodojn por helpi nin lerni Esperanton. Ili ne nur instruas al ni la bazajn gramatikajn regulojn, sed ankaŭ klopodas disvolvi nian parolan kapablon kaj malfermi nin al la mondo, konigante al ni lokajn kaj internaciajn Esperanto-agadojn kaj aliajn kulture interesajn aferojn. Tiel, ekzemple, ni spektis Esperantajn filmojn, legis librojn kaj revuojn, kantis Esperantajn kantojn kaj verkis Esperantajn poemojn. Tiuj agadoj ne nur plilarĝigis mian horizonton kaj donis al mi pli bonan komprenon de la vasteco de Esperantujo, sed ankaŭ permesis al mi persone sperti kulturajn diferencojn kaj la ĉarmon de interkultura komunikado.

Per la ŝanco donita de mia instruistino en nia ĵurnalisma kurso, mi eksciis pri STARTO. Per mia mallonga legado, mi vidis, ke certe ĉeĥaj Esperantistoj amas

Esperanton, ĉar ofte estas eldonitaj novaj Esperanto-libroj kaj same multas klubaj aktivadoj, Esperanto-konferencoj kaj aliaj eventoj. Dank' al la perado de Esperanto, eĉ restante en Ĉinio, ŝajnas al mi, ke mi iel povas kompreni vian kulturon. Sed la allogaj paĝoj de via revuo certe donas al mi la emon iam viziti vian landon kaj ĝiajn samideanojn persone.

Feliĉe nia universitato donas al ni multajn ŝancojn partopreni en Esperantaj agadoj. Kun miaj samklasanoj, mi partoprenis en la Landa Kongreso en Pekino en 2022 kaj en la 10-a datreveno de la Esperanto-Muzeo de Zaozhunag-a Universitato en 2024. En tiaj okazoj, mi renkontis multajn spertajn Esperantistojn kaj mi sincere respektas ilian fluan paroladon kaj riĉan pensadon, kiuj helpis min kompreni Esperanton pli bone. Krome, mi vizitis plurfoje la Esperantan Arbaron en Zaozhuang. Mi ankoraŭ neniam iris eksterlanden por Esperantaj konferencoj, kvankam kelkaj el miaj samklasanoj povis tion fari. Sed mi certe revas persone vidi la Universalan Kongreson, pri kiu mi multe aŭdis kaj mi aparte ĝojas, ke en la somero 2025 ĝi okazos en via bela lando. Esperante povi tiam renkonti vin persone, mi sendas al vi miajn plej varmajn salutojn el Zaozhuang.



76-a Kongreso de IKUE 2. – 9. 8. 2025 Brno, Ĉeĥio

En la jaro 2025 festos IKUE 115-an datrevenon de sia ekzisto, kio estos unu el la temoj de la kongreso, kies ĉefa temo estas:

Pilgrimado en la lumo de la kredo.

La kongreso estis planata por la dato 26.7. – 2.8.2025 en la Eklezia hejmo de junularo Petrinum, sed kiam la UK estis ŝovita al tiu dato, IKUE-kongreso ankaŭ devis sin ŝovi unu semajnon poste.



Okazos prelegoj, seminario, pilgrimoj, fakvizitoj.

Informojn vi povos akiri per retadreso: ikuekongreso@gmail.com

58-a ILEI-kongreso

19 – 26 julio 2025

Beogrado

<https://eventaservo.org/e/ILEI-58>

Kongreso de esperanto-instruistoj.

81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) 2025 en Indonezio

okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en [Alfa Resort Hotel & Conference](#) en la distrikto de Cisarua, ĉirkaŭ 75 kilometrojn sude de la indonezia ĉefurbo, Ĝakarto. Dum la kongreso, partoprenantoj ĝuos tutan semajnon ĉirkaŭate de montoj kaj tropikaj arbaroj kun milda klimato kaj kune enprofundiĝos en la lokan kaj la esperantan kulturojn. La kongreso, kiu okazos sub la temo: **“Diverseco, solidareco, kaj toleremo,”** ankaŭ proponas grandan okazon por amikiĝi, lerni, kaj kunlabori kun samideanoj el diversaj partoj de Azio kaj Oceanio, kies amasan partoprenon ĉi tiu kongreso antaŭvidas.



Malgraŭ la nomo “Junulara,” la IJK ĉiam, kaj, sen esceptoj, estas malfermita al samideanoj el ĉiuj aĝoj, lingvoniveleoj kaj kontinentoj.

Ne hezitu aliĝi tuj ĉe


<https://ijk2025.tejo.org/alighilo>

Ne forgesu ankaŭ [iĝi individua membro aŭ patrono](#) de TEJO en 2025 por ricevi grandan rabaton al via tuta kotizo.

Ni ankaŭ bezonas vian malavaran subtenon. Estas multaj aktivaj kaj promesplenaj junaj movadanoj el Azio kaj Oceanio kiuj ne povas financi sian vojaĝon al la IJK.

Simon Marius kaj Galileo Galilei

La 26-an de decembro 1624 laŭ julia kalendaro kaj la 5-an de januaro 1625 laŭ gregoria kalendaro forpasis germana matematikisto, kuracisto kaj astronomo Simon



Mayr, kiu sin nomis Marius (1573-1625). Samtempe kaj sendepende de Galileo Galei li malkovris la kvar satelitojn de Jupitero, sed ĉar li publikigis sian malkovron nur en la jaro 1614 en verko *Mundus Iovalis*, dum Galileo jam en 1610, Galileo lin kulpigis pri plagiato. Ankaŭ la fama Otto-enciklopedio diras, ke ia Simon Mayr atakis Galileon. Pro tio li estis elpelita el la scienco kaj historio kaj preskaŭ forgesita, kvankam la nomoj de la satelitoj *Io*, *Europa*, *Callisto* (amatinoj de Zeŭso) kaj *Ganymedes* (favorato de Zeŭso) devenas el lia publikaĵo. Tamen li modeste konfesas, ke la nomojn elektis Johano Kepler, kiam ili

renkontiĝis en Regensburg. Krom tio Marius vidis kelkajn detalojn de la satelitoj, kiujn Galileo pretervidis.

Nun oni klopodas rehonorigi la scienciston kaj helpe de Esperanto tradukigi la retejon pri liaj vivo kaj verko en aliajn lingvojn. Pri la ĉeĥa traduko jam inter la jaroj 2013-2018 estis petita M. Malovec de Sabina Hauge, kiu tiutempe kontroladis Startojn.

Interese estas, ke en la jaro 2023 aperis esperantlingva traduko de la dramo *Vivo de Galilei* fare de Bertold Brecht (1898-1956), kiu priskribas, kiel Galileo malkovris la satelitojn de Jupitero, sed vane klopodis konvinki religiajn fanatikulojn, ke la lunoj flugas ĉirkaŭ Jupitero. Ili eĉ ne volis rigardi en lian teleskopon. Sed niaj membroj en la asocia kongreso en Pardubice (2022), kiam ili vizitis lokan stelobservejon, rigardis tre volonte kaj vidis ĝuste Jupiteron kun ĝiaj kvar lunoj.

Sed ni revenu al Simon Marius kaj lia retejo <https://www.simon-marius.net>. Li devenis el Gunzenhausen, sed travivis preskaŭ la tutan vivon en Ansbach, kie li estis en 1601 nomumita juĝeja matematikisto. Samjare li foriris al Prago por konatiĝi kun novaj observaj teknikoj de Tycho de Brahe; post ties morto li forveturis studi medicinon al Padovo, kie li doktoriĝis en 1605.

La Internacia Astronomia Unio honorigis Marius, kiam ĝi nomis per lia nomo unu asteroidon kaj lunajn krateron, montetojn kaj kanalon. Gimnazio en Gunzenhausen akceptis lian nomon. En urboj, kie li aktivis, ekzistas stratoj kun lia nomo.

Li postlasis 6 sciencajn verkojn, 29 kalendarojn (1601-1629), 3 verkojn, kiujn li kunaŭtoris, al kelkaj li kontribuis per artikoloj. La rubriko *Sekundara Literaturo* en la retejo listigas preskaŭ 250 verkojn, kiuj estas dediĉitaj al li aŭ mencias lian laboron.

Tamen li restas nekonata de la vasta publiko, dum Galileon konas ĉiuj. Maljustan senhonorigon ĉiam estas malfacile korekti.

Miroslav Malovec

Kristoforo Kolumbo kaj Amerigo Vespucci

Amerikon malkovris Kristoforo Kolumbo (1451-1506) el Ĝenovo, sed la nomon ĝi ricevis laŭ Amerigo Vespucci (1454-1512) el Florenco. Ambaŭ samaĝuloj de Leonardo da Vinci (1452-1519) estis konsiderataj malkovrintoj de la nova kontinento, Amerigo poste kulpigata, ke li priŝtelis Kristoforon. Stefan Zweig (1881-1942) en sia libro *Amerigo*, aperinta postmorte (1944), klarigas, kiel ĉio okazis.

Matematikisto Paolo dal Pozzo Toscanelli (1397-1482) surbaze de eraraj indikoj de antikva greka astronomo Klaŭdio Ptolemeo (87-170) elkalkulis, ke la longeco de la ekvatoro estas 29.000 km (anstataŭ 40.000), sekve la marvojon inter Eŭropo kaj Hindio povas tiamaj velŝipoj venki dum du monatoj, male la vojaĝo ĉirkaŭ Afriko daŭrus 6 monatojn. Tiu eraro instigis Kristoforon Kolumbon provi tiun hipotezon kaj kiam li post du monatoj efektive albordiĝis ĉe insuloj loĝataj de homoj (1492), li kredis, ke la teorio estas pruvita kaj ke li venis al Hindio. Sep jarojn poste (1499) revenis el Hindio ĉirkaŭ Afriko portugalo Vasco da Gama (1469-1524) kun ŝipoj plenaj de trezoroj.

Novaj kuraĝuloj preparis ekspediciojn por esplori ambaŭ direktojn. En kvar el tiuj, kiuj celis okcidenten, partoprenis Amerigo Vespucci kiel navigisto aŭ komerca observanto en servo de Mediĉeoj, nome: **unua** 10. 5.1497 - 15.10.1498, **dua** 16.5.1499 - 8.9.1500, **tria** 10.5.1501 - 15.10.1502, **kvara** 10.5. 1503 - 1504. Ĉiun el la kvar vojaĝoj li priskribis tre vigle en privataj leteroj al Mediĉeoj kaj en la tria li venis al konkludo, ke la atingita lando ne estas Hindio, sed tute Nova Mondo inter Eŭropo kaj Hindio, ĉar tie vivas nekonata homa raso, nekonataj animaloj kaj plantoj.

Kopio de tiu letero tradukita al la latina estis presita kaj en 1503 disvastigita tra Eŭropo kiel sensacio, vendata en foiroj, bazaroj kaj kermesoj, ĉar tiam ankoraŭ ne ekzistis gazetaro, sub titolo *Mundus Novus* de Albericus Vesputius. Ĝi estis tradukata en aliajn lingvojn. En 1504 venecia presisto Albertino Vercellese kunmetis diversajn atingeblajn raportojn en unu volumon, alia nekonata presisto en Vicenza preparis 126-paĝan antologion (1507) sub titolo *Nova mondo kaj landoj malkovritaj de Alberigo Vesputio el Florenco*.


En urbeto Saint-Dié-des-Vosges en la historia regiono Loreno duko René kolektis kelkajn doktajn virojn, presiston Gauthier Lud, geografon Martin Waldseemüller, poeton Mathias Ringmann kaj lingviston Jean Basin, kiuj elpensis fabelon, ke Vesputius ĉion rakontis al ilia duko. La 25-an de aprilo 1507 ili eldonis Kosmografion de Ptolemeo, sed aldonis la kvar vojaĝojn de Amerigo Vespucci kiel kompletigon de Ptolemeo per nove malkovritaj landoj. Ili jam sciis, ke lia ĝusta nomo estas Amerigo Vespucci. Geografo Waldseemüller desegnas en la mapon de Ptolemeo novan insulon kaj marĝene skribas, ke ĝia nomo estas America. En postaj eldonoj de la mapo li nomas ĝin Terra Incognita (Nekonata Tero), sed Ameriko jam enradikiĝis.

Stefan Zweig konkludas, ke Kolumbo ĝis sia morto ne eksciis, ke li malkovris novan kontinenton, kaj Vespucci ĝis la morto ne eksciis, ke la nova kontinento estis nomita laŭ lia baptonomo (kiu devenas de tiam populara hungara sanktulo Sankta Imre, en aliaj lingvoj nomata Emerich, Emerik, Emerikus, Americus, Amerigo). mm

Floreal Gabalda

(1946 – 2024)

Dum lastaj jaroj preskaŭ en ĉiu numero de Starto aperis raporto de Floreal kaj lia ĉeĥa edzino Liba Gabalda pri iu grava internacia esperantista evento. Li fotis, ŝi verkis tekston. Ekde 2015 sume 34 artikoloj.



Floreal Gabalda naskiĝis en Francio en 1946 al hispanaj gepatroj. Post la bakalaŭriĝo en 1965 li studis en universitatoj de Grenoblo kaj en la jaro 1971

ricevis titolon Doktoro-Inĝeniero. Li estis tre modesta. Poste, anstataŭ la militservo, li preferis labori kiel kooperanto kaj profesoro en Venezuela Universitato de Teknologio (IUT) en Karakaso, kie li restis kvin jarojn. Esperanton li ellernis samtempe kun sia patro fine de la 1963a jaro. Li tuj komencis serioze aktivigi en Venezuela Esperanto-Asocio, en junulara movado kaj en SAT. Li estis honora membro de TEJO. Kun sia edzino li konatiĝis en la jaro 1978 dum la 63-a Universala Kongreso en Varna (Bulgario). Post la geedziĝo en Ĉeĥoslovakio ili reiris Venezuelon en la jaro 1980, kie li daŭrigis sian profesian postenon de profesoro. Kune ili aktivis en VEA. Floreal fariĝis la vicprezidanto, Liba kasistino kaj ŝi iniciatis la E-kronikon. Ili ambaŭ ankaŭ instruis Esperanton. En Karakaso naskiĝis iliaj du infanoj Belonia kaj Ideal, ambaŭ denaskaj esperantistoj. Post la malfavora situacio en Venezuelo ili revenis Francien en la jaro 1986a. Ili partoprenis multnombrajn


E-kongresojn, seminariojn kaj aliajn E-aranĝojn: UK, IK SAT, IFEF, ILEI, MES, PSI, BET, jarfinajn renkontiĝojn en Germanio: IF, NR, Luminesk, seminariojn en Kvinpetalo, kastelon Greziljono, Metabief, Internaciajn E-Semajnojn en Hispanio kaj plurajn aranĝojn en Ĉeĥio. Ili ŝatis vojaĝi, viziti multajn landojn kaj ĝui esperantistan etoson. Floreal forpasis pro la kancero la 4an de decembro 2024. Li tre multe mankos al ni.

Liba Gabalda

Břetislav Švidrnoch

(1931 – 2024)

Komence de decembro 2024 forpasis **Inĝ. Břetislav Švidrnoch, CSc** el Hranice na Moravě en la aĝo de 93 jaroj (nask. 17.6.1931). Li estis inteligenta,



klera, sportema, sciis ĉirkaŭ 15 lingvojn, esperantlingva marŝanta vortaro. Junaĝe skianto, turisto, astrologo, li sciis trovi akvofonton, praktikis akupunkturaron kaj akupresuron. Ĉiam gaja, kompleza, empatia,

trezorejo de scioj. Nun restis en la klubo de Hranice nur kvar membroj, kiuj renkontiĝas trifoje jare.

Olga Káňová

Tristaj informoj el Germanio

Atingis nin informo pri forpaso de konataj germanaj esperantistoj **Reinhard Föbmeier** (1955-2024), **Christian Darbellay** (1952-2024) kaj **Sebastian Kirf** (1977-2024).

Sacerdoto, psikiatro kaj esperantisto Max Kašparů ricevis la titolon Elstara Doktoro



Unu el la ĉefaĵoj de la renkontiĝo ĈMĈ estis la ceremonia aljuĝo de la premio "Elstara Kuracisto de la Pelhřimov-regiono." Ĉi tiu prestiĝa premio, tradicie anoncita de la Distrikta Asocio de la Ĉeĥa Medicina Ĉambro, celas rekonii kuracistojn, kiuj signife kontribuis al la evoluo de medicino en la regiono aŭ riĉigis ĝin per siaj agoj kaj profesiaj scioj.

Por la jaro 2024 tiu ĉi premio estis aljuĝita al prof. PaedDr. Dr. MD kaj MD. Max Kašparů, PhD, dr.h.c., ICEAH, kies eksterordinara profesia kaj persona kariero fariĝis inspiro por la tuta medicina komunumo. En emocia danka parolado prof. Kašparů rememoris siajn komencojn en la hospitalo de Pelhřimov antaŭ pli ol kvindek jaroj, kiam li kandidatiĝis por la posteno de psikiatro.

Profesoro Kašparů havis admirindan karieron. Post komenca studado de dentokuracado en Karola universitato li daŭrigis siajn studojn en ĝenerala medicino en la universitato de Komenio en Bratislavo. Li poste specialiĝis pri psikiatrio, kie li akiris atestadojn ĝenerale kaj en infan- kaj adoleska psikiatrio. Li plue vastigis sian edukon en la lokoj

de psikosomatiko, psikoterapio kaj hipnoterapio, kie li ankaŭ ricevis PhD-gradon. Liaj akademiaj agadoj ankaŭ inkludas pedagogion, etikon kaj teologion, kio estas signoj de lia speciala perspektivo. Li publikigis pli ol tridek librojn, kelkaj el kiuj estis tradukitaj en fremdajn lingvojn. Lia literatura verko kombinas medicinajn kaj spiritajn temojn, kiuj reflektas la amplekson de liaj interesoj kaj kapablon ligi diversajn aspektojn de homa vivo.

Li ankaŭ laboras kiel du-rita katolika pastro (de ritoj rom- kaj grekkatolika), kaj lia spirita agado estas integrita parto de liaj persona kaj profesia vivoj.

MD Jan Foltin, kiu nomumis profesoron Kašparů por la premio, laŭdis lian kapablon per empatio percepti la problemojn de homoj kaj trovi ne nur profesiajn, sed ankaŭ humanajn konsilojn por ili en sia ferma parolado. Li ankaŭ laŭdis lian kuraĝon nomi aferojn sub iliaj ĝustaj nomoj kaj lian kapablon alparoli aŭskultantojn kun humuro kaj prudento. "Li estas personeco, kiu inspiras kaj riĉigas ne nur nian regionon, sed ankaŭ la pli larĝan medicinan komunumon," finis MD. Foltin.

La premio "Elstara Doktoro de la Pelhřimov-regiono" ne nur omaĝis la unikan profesion karieron de prof. Kašparů, sed ĝi ankaŭ memorigis nin kiel esenca estas la kombinaĵo de kompetenteco, homaro kaj humuro en la ĉiutaga laboro de kuracisto.

*Laŭ Pelhřimovské noviny 12/2024
prilaborita kun helpo de Pavol Petrik
Foto Petr Václavek, bofilo de M. K.*

JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2025

Božena Glončáková, Vrbno pod Pradědem
Antonín Hillebrand, Rychnov u Jablonce
Ing. Max Hillebrand, Bratříkov
Jiří Hron, Pardubice
Petr Janeba, Choceň
Miroslava Kosnarová, Pardubice
Mgr. Olga Lacinová, Třebíč
Marie Lipoldová, CSc., Praha
Josef Nejman, Rychnov nad Kněžnou
Ladislav Němec, Frýdek-Místek
Jiří Pěnek, Kašperské Hory
Ludmila Smolová, Jablonec nad Nisou
Olga Urbancová, Karlova Vary
Ing. arch. Anna Vyšínková, Vracov
Jiří Žák, Hranice
Daša Macíčková, Veřovice

Sanon kaj bonhumoron al ĉiuj!

Jarkunveno en Svitavy

La 15-an de februaro 2025 okazis en Svitavy la jarkunveno de Klubo de Amikoj de Esperanto. En 2024 okazis 41 aranĝoj kaj ni planas la saman nombron en 2025. Ni klopodos konservi aranĝojn por infanoj kaj ankaŭ vojaĝvesperojn, kunlaboron kun lernejoj kaj nove kun la Aŭtomotoklubo. Ĉar la monda kongreso okazos en Brno kaj ĈEA ne planas eldoni propagandajn materialojn pri la Muzeo de Esperanto, ni mem klopodos aranĝi ion. Ni atendas viziton de esperantistoj en Svitavy kaj ni ŝatus surprizi ilin per io. Nuntempe ni preparas **novan ekspozicion**, kies malfermon ni kombinos kun nia **Muzea Nokto la 30/31-an de majo**. Vi povas ekscii ĉiujn novaĵojn ĉe niaj Fejsbukaj paĝoj aŭ en la retejo de Esperanto-Muzeo.

Libuše Dvořáková

Jarkunveno en Brno



La prezidanto M. Kolka tralegis raporton pri la agado kaj la kasistino J. Zigal pri la mastrumado de la klubo.

En la jaro 2024 okazis 18 kunvenoj ĉeestaj, 18 retaj eĉ kun eksterlandaj prelegantoj. Ni gastigis grupon E-mental kaj polan grupon el Gliwice. En Mahenbiblioteko prelegis J. Vojáček, en Moravia Landa Biblioteko (al kiu ni donacis niajn librojn) prelegis Milan Kolka. Li gvidis ankaŭ du kursojn, retan marde kaj ĉeestan ĵaŭde.

M. Kolka kaj M. Malovec partoprenis UK-on en Tanzanio, kie ili transprenis la kongresan flagon. M. Kolka prelegis pri la kongreso en restoracio Siwa. Septembre la klubo havis tablon ĉe Eŭropa Tago de Lingvoj. M. Kolka havis prelegon ankaŭ en gimnazio en Břeclav.

O. A. Fischer eldonis du librojn, nome pri kaktaj kaj orhideoj, kaj kun M. Malovec togoŝlandajn fabelojn de K. Sagbadjelou. J. Vojáček tradukis tekstojn por teatro Agadir.

M. Kolka finis studadon de interlingvistiko en Poznano kaj kun I. Koutny preparis retan version de ŝiaj vortaroj.

Miroslav Malovec

FORPASI RENATO CORSETTI (1941-2025)

HONORA PREZIDANTO DE UEA

UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis D-ro Renato Corsetti (naskiĝis la 29-an de marto 1941) la 1-an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001-2007) kaj honora prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.



Naskiĝinta en Romo, li komencis sian profesion karieron en banko. Li ekaktivis en la Esperanto-movado fine de la 1960-aj jaroj kaj baldaŭ poste iĝis Prezidanto de TEJO (1971-1973). La Estraron de UEA li unue eniris en 1980 kaj oficis ĝis 1986; denove en 1998 kiel Vicprezidanto kaj en 2001 kiel Prezidanto de UEA. Dum sia longa kariero en UEA li aktivis en multaj komisionoj kaj kunlaboris en multaj projektoj kun aktivuloj tra la mondo, ekzemple en la Instituto Hodler '68, kie li estis Prezidanto (1980-1986) kaj Vicprezidanto (ekde 2002). En 2011, rekonante lian longdaŭran agadon por la Asocio, la Komitato de UEA deklaris lin Honora Membro kaj en 2023 nomumis lin Honora Prezidanto okaze de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino. Li ankaŭ ricevis la Premion Deguĉi en 2008. Krom siaj honoraj titoloj kaj premioj en UEA li ankaŭ estis Honora Prezidanto de TEJO. En la pasintaj kelkaj jaroj li aktive kunlaboris por informa agado de UEA, kunordigante projektojn pri disvastigado de

afiŝoj rilate al lingva justeco kaj okaze de la Esperanto-Tago kaj la Tago de la Gepatra Lingvo. Krome lia agado ne limiĝis en UEA kaj TEJO: li ankaŭ estis estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj. Li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en 1998.

Li estis lingvisto kaj profesoro, ofte prelegante aŭ verkante en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li aŭtoris multajn artikolojn kaj librojn. Li instruis psikolingvistikon en la Universitato "La Sapienza" de Romo en la 1990-aj jaroj kaj estis profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino.

UEA perdis ne nur eksan prezidanton, sed ankaŭ gravan kunlaboranton, amikon kaj unu el la plej gravaj motoroj en la moderna historio de la Asocio. UEA esprimas siajn profundajn kondolencojn al la tuta familio, ĉefe al lia edzino Anna Löwenstein, mem honora membro de UEA kaj eminenta Esperanto-instruisto, kaj al liaj tri filoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 1212



Mi estas tre feliĉa, ke mi povis renkontiĝi kun Renato Corsetti en la tanzania Aruŝo pasintjare. Mi dankis lin pro la helpo, kiun li donis al ni en la edukado de niaj filoj – denaskaj esperantistoj antaŭ 35 jaroj. *jt*

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
06946 konference/sjezd ČES
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1480,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 870,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1500,- Kč (*1000,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Novaĵo!

GOLEMO kiel E-Libro

<https://lurl.cz/119Ry>

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
56. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2025

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 56-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2025

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopajn prelegojn sekvu en
Eventaservo.org kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz).

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj
de E-Klubo en Brno (Esperantobrna.cz).
Gastoj bonvenas!

2025

2025-04-05 [Sabla Printempo](#)

info: pisek@esperanto.cz

2025-07-19-26 [KELI-kongreso](#) en Pardubice

info: polnickypavel@seznam.cz

2025-08-2/9 [IKUE-kongreso](#) en Brno

info: ikuekongreso@gmail.com

2025-07-26/08-02 [110-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO EN BRNO](#)
<https://uk.esperanto.net/2025/duabulteno>

2025-07-26/08-02 53-a [Infana Kongreseto](#)
en Brno, info: infanakongreseto@gmail.com

2025-08 Fervojista renkonto en Hranice

2025-09-06 Fervojista renkonto en Choceň

2025-09-22/24 Fervojista konferenco en
Ramzová, info: <http://ifef.wz.cz/>

2025-10-17/19 [ĈEA-kongreso](#) en Havířov

Elektio de gravaj aranĝoj eksterlande

[2025-07-26/08-02](#)

2025-03-15/22 Mediteranea Esperanto-Semajno

info: <https://esperanto-provence.org>

2025-04-30/05-04 74-a [IFEF-Kongreso](#) Žilina

info: ifk@ikso.net

2025-05-08/11 [Aŭstria E-Kongreso](#) en Graz

info: officejo@esperanto-graz.at

2025-07-05/13 59-aj [Baltiaj](#)

[Esperanto-Tagoj](#) en Kaunas, Litovio

info: litova.ea@mail.lt

2025-06-06/08 35-aj [Esperantaj Tagoj](#) de

Krakovo, info: kse.krakovo@gmail.com

2025-08-09/16 81-a [IJK](#) en Cisarua, Indonezio



Amatora aktorino
Stanislava Hošková
daŭrigas laboron de Eva
Seemannová per spektakloj
pri niaj reĝinoj - ĉi-foje pri
Johanka el Rožmitál, edzino
de Georgo de Poděbrady -
25.3.2025 en Mladá Boleslav.



Zamenhof-tago en Mladá Boleslav



Hotelo, kie estos salono Zamenhof



Jarkunveno en Svitavy
la 15-an de februaro 2025



Loko de la infana kongreseto



Mendel-universitato, nia kongresejo



Nacia vespero okazos en la kastelo Špilberk